



ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ĈIULANDA VIVADO: La lernejoj en la FILIPINA INSULARO, speciale por «Tra la mondo» de *Hon. Shuster*, ministro de Edukado en MANILA, tradukita de D^o W. Yemans (MANILA).

TRA LA MONDO: Kelkaj miroj en Nov-Yorko, de *William C. Baff* (USONO).

FELIETONO: La mezurado de l'metro, de *E. Bacquet* (FRANCUJO).

DIVERSAJ SCIENCJOJ: Arĥeologio, Praha de D^o *Luboš Jeraběk* kaj *Jaroslav Šilko* (BOHEMUJO). Pri P^o *Cornil*.

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: Ludovic Halévy, kaj François Coppée de P^o *Buquet* (FRANCUJO).

PRI ESPERANTO: La Skota lingvo kaj Esperanto, de *James Malloch* (SKOTLANDO).—Internaciaj enketoj, de Ing. *Rollet de l'Isle* kaj *Monrosier* (FRANCUJO), *R. Frenkel* (SIBERUJO), *Kroniko*, de *Steleto*.

ĈIULANDA LITERATURO: Finiĝo de kursaro, de *Jos. Pion* (FRANCUJO). Mektub, de *A. Baissac* (ALĜERIO).

DIVERSAJĜOJ: Konkursoj, ludoj, de *Brunel Ch.*



Abono. Jara : 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona : 4.50 fr (1,80 Sm.).

La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Adreso: «Tra la mondo» Meudon (S. & O.) France.


Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Oni skribu legeble, sur respond-poŝtkarto; aŭ oni aldonu respondkuponon al la leteroj.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 sd).

Oni rememorigu ĉiam pri sia adreso.

Adresŝanĝoj estas farataj nur laŭ peto akompanata de 50 centimoj (20 Sd.)



«Tra la Mondo» aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.

ATENTU, Sinjorino

vi ekdikigas, kaj dikigi estas maljuniĝi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reĝos svelta.

La **flakono** da 50 drageoj estas sendata aŭfranke de la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY.**

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

Ekskursoj al Fontainebleau kaj Moret.

Ekskursaj vagonaroj okazos Dimanĉe la 14an, 21an kaj 28an de Junio, 5an, 12an, 19an kaj 26an de Julio, inter Paris, Fontainebleau kaj Moret.

Prezo de l' lokoj, iro kaj reiro.

Fontainebleau	2 ^a kl.	4 fr. 50
	3 ^a kl.	3. »
Moret.	2 ^a kl.	5 fr. 50
	3 ^a kl.	3. »

Deiro de Paris je 7 h. 26 mat.

Alveno al } Fontainebleau 8 h. 41 mat.
Moret. 8 h. 56 »

Reiro per ĉiuj Dimanĉaj vagonaroj, en la kondiĉoj rilataj al la ordinaraj vojaĝantoj. Nombro de lokoj limigita. Senpageco de 30 kg. da pakajoj por ĉiu loko.

PARIS-ORAN.

La luktusa vagonaro « Paris-Barcelone-Valence » iras ĝis Kartageno, kun daŭro per ŝipo (marveturado 9 hor.) inter Kartageno kaj Oran; li korespondas ĉe Oran kun ekspresoj de kaj al Alĝero.

Deiro de Parizo P. L. M. merkrede kaj sabate je 7 h. 20 vesp. Alveno en Kartageno, vendrede kaj lunde je 8 h. 45 mat.; en Oran, vend. kaj lunde je 6 h. 45 vesp.

VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78^a milo franca tradukis

EMILIO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilio Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe liaj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj S^{ro} Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (*Svisujo*).

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.

(Internacia esperantista libbrejo)

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondataĵoj, manuskriptoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn.

Urgaj sciigoj; **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la tuj elironta Numero.

ONI ABONAS ĉe nia administracio (Vidu la 1an paĝon) aŭ ĉe la esperantistaj gazetoj kaj abonejoj. Oni aldonu ĉiam la abonpagon.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Le Phare Sténographique. Revue mensuelle illustrée. Organé Sténo-Dactylographique et Espérantiste. Francujo 3 fr. Fremdlande 4 fr. 1,60 Sm. 60, Rue des Carmes, Rouen.

Les langues vivantes. Duonmonata ilustrata revuo por praktika instruo de l' vivantaj lingvoj. Aperas angle, france, germane, hispane, itale, kaj Esperante. Francujo 3 fr. Fremdlande 4 fr. 1,60 Sm. 4, rue Madame, Paris.

ARMÉE ET MARINE.

Duonmonate ilustrata revuo de l' teraj kaj maraj armeoj.

Korespondantoj en ĉiuj landoj.

JARE:

Francujo, 12 fr. — Fremdlande 18 fr. 7,20 Sm.

Unu Numero 40 c. 16 Sd.

Administracio:

9, Boulevard des Italiens, Paris.

NOVAJ ORGANOJ.

Rumana Esperantisto, oficiala organo de la Rumana esperantista Societo. Bela dumonata revuo, enhavanta ĝojigan sciigon pri la intereso de la Reĝino de Rumanujo (en literaturo « Carmen Sylva ») al Esperanto. 5 fr. 2 Sm.: Bukareŝto, 5 str. I. C. Bratianu.

Eŭropa Kristana Celado, organo de la Kristanaj Celadistoj. Estas grava fakto, ke la specialfakaj gazetoj konstante plimultiĝu. Ni salutas kore tiun ĉi, aperanta de nun angle kaj Esperante, sub lerta direktado de nia distinginda Samideano, D^{ro} de Sausurre, direktoro de « Internacia Scienca Revuo ». 2 fr. 0,80 Sm. ĉe S^{ro} Briquet, 4, Cité, Genevo.

The Esperanto News, Duonmonata propaganda organo en angla lingvo kaj Esperanto. 5 fr. 2 Sm, 10, Wall Street, Room 510, New-York.

Internacia Esperanta Revuo, Komerca kaj interrilata gazeto en Esperanto 5 fr. (2 Sm.), ĉe S^{ro} Marich Agoston, Budapest IX, Ŭllői-ut 59. IV, 8.

LA INTERNACIA TRINKAJO VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark

N^o 270,042

Marque Déposée

N^o 13,195

Registered label N^o 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C^o

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).

Praha.

de D^{ro} LUBOŠ JERÁBEK (1).

BOHEMA NACIA TEATRO.

graciaj turetoj, radiantaj per ĉiuj tonoj de nepriskribebla kolorskalo — en bluetaj vaporoj de okcidenta horizonto levigas, kvazaŭ enteksita en sorĉan vualon, duberuga silueto de sanktigita Hradčany, la plej fiera akropolo de la mezepoko, ĉirkaŭita de la sorĉo de glora estinteco kaj de grava historio, kies ĉeestanto ĝi estis.

Kaj sub tiu ĉi majesta kastelo, kiu laŭ la situacio ne havas egalan — en maro el domoj, inter kiuj, kiel freŝaj oazoj el mal-luma grizaĵo kaj flavaĵo de muraroj, mole kaj varme lumas al ni sate verdaj tonoj de vastaj ĝardenoj, — alte levigas majestaj sanktejoj de sennombraj preĝejoj.

Cento da iliaj turoj, maldikaj kaj graciaj, levigas al la ĉielo kiel lancoj de mezepokaj regimentoj, rigardante fiere malsupren al aroj da ĉirkaŭstarantaj konstruaĵoj!

Ankoraŭ pli malproksime, post la periferio de la vasta urbo, en ruĝete traradiata haladzo de suda horizonto — mole sin desegnas la pompaj, kvazaŭ duone diafanaj, siluetoj de majesta Vysehrad, kliniganta malsupren al l' argento de l' Ultava.

Malproksimete en oriento estas la malhela monteto de memorinda « Zizkov », kaj pli malproksime oni vidas la ĉirkaŭajn montojn, banantajn sin en amasego da orflavaj tonoj de l' suno, radiantaj ĉi tien.

Kaj super ĉio, tute ĉe ni en antaŭaĵo staras malhele verda dorso de grandega « Petrín » kun zigzagaj supraĵoj de la « malsata muro » de Karolo IV, kliniganta al sankta Siono kaj al turoj de la antikva kaj fama kanonikejo de « Strahov » ĉirkaŭita de malhele verda kadro de ĝardenoj de kvartalo « Malá Strana ».

Tio ĉio formas bildon de eksterordinara beleco, brilan fabelon, verkitan por ni de la mezepoko — brilan sonĝon de bohema animo — la plej belan el slavaj urboj — nomitan Praha!

II.

Praha! La nomo mem estas kanto, tiu ĉi sola sono rave vibrigas la kordojn de l' bohemiaj animoj, kaj ekscitadas la korojn.

SVATOPLUK ČECH.

Vere ne estas mirinde, ke, jam de pratempaj, plej famaj verkistoj eŭropaj vicigas nian belegan turcentan patrineton Praha inter la plej belaj urboj eŭropaj.

Jam en mezepoko de longe pasinta nia « Cosmas » diras per elokventaj vortoj metitaj en la buŝon de princino kaj profetistino Libuša:

« Mi vidas grandan urbon, kies gloro tuŝas la ĉielon » (2). Post li ankaŭ la fama Aeneas Silvius rajte nomas Praha'n « reĝino de urboj ». Egale entuziasme gloras ĝin poetoj kaj verkistoj eĉ novtempaj. Ĉiam neforgesebla restas granda vorto de granda genio de la germana nacio, Goethe, kiu nomis Praha'n « la plej altvalora juvelo de la tera ŝtonkrono » (3).

Same la fama vojaĝanto Humboldt vicigas Praha'n, majeste vastigantan sur la bordoj de Ultava sur sep altaĵoj, kiel Romo, riĉan je historiaj memorindaĵoj — en kvaran vicon de la plej belaj urboj eŭropaj, kaj la fama franca geografiisto Elisée Reclus nomas Praha'n entute « unu el plej belaj urboj de la mondo ».

Kaj ĝi estis ankoraŭ pli belega, Praha antaŭa, tiel, kiel ĝin vidis la plej glora gotikisto de la estinta centjaro, la glora franca arkitekturo « Viollet le Duc », kiu kun entuziasmigaj vortoj valorigas ĝian gravecon historian kaj arkitekturan, per kiu ĝi superas eĉ Nürnberg'on, gloritan en la tuta mondo pro ĝia antikva karaktero. Li diras en siaj famaj leteroj el Germanujo: « Praha estas urbo pleje antikva, bela, kun belaj domoj, kun disemitaj grandegaj konstruaĵoj, metita sur ambaŭ bordoj de potenca rivero kaj kronita de akropolo, kiu konservis vidigon de grandioza gotika fortikaĵo, ĉirkaŭita de zono el kastelaj muroj, paralelaj kun la malrekteco de altaĵo, kiu estas ĝia piedestalo. Nürnberg malgraŭ sia riĉeco arkitektura lacigas per troa malsameco de siaj detalaĵoj: la konstruaĵoj, unu sur la alia, kondukantaj al stratoj aŭ al urbaj placoj malmulte spacaj, nenie permesas ripozi al rigardo. Ŝajnas eĉ, ke oni volis amasigi en tiu ĉi urbo sur unu lokon ĉion, kion la mezepoko sukcesis krei ».

Kun ankoraŭ pli granda entuziasmo skribas pri Praha la konata franca estetikisto kaj kritikisto William Ritter. Memorigante la amon de Viollet le Duc por Praha, li mem esprimas sin pri ĝi jene: « Kiam Viollet le Duc ekkonis Praha'n, ĝi estis tiel mirinda urbo, ke ĉiu ŝtono estus meritinta apartan priskribon. Sur la tuta supraĵo de l' tero ne estis malfermita pli

KATEDRALO DE S^{tu} VITO KUN LA KASTELO; HRADČANY KAJ ŜTONA PONTO EN LA JARO 1347^a.

(1) Bohema antaŭparolo al verko « Beautiful old Prague ».

(2) Urbem conspicio famaque sidera tanget.

(3) Der Mauerkrone der Erde kostbarer Stein.

belega libro de historio kaj arĥitekturo. Aliaj, kaj alie belegaj, — jes — sed pli belegaj neniam. » Ankaŭ la fama skulptisto Rodin interesiĝis pri Praha, kaj ĝuste nomis ĝin « Norda Romo ».

Sincera amiko de nia nacio, grafo D^r de Lützwow, en sia eminenta verko « The Stoory of Prague » karakterize valorigas la signifon historian de Praha per ne multaj sed gravaj vortoj: « Kiu en Praha ĵetas ŝtonon tra fenestro, tiu forĵetas kun ĝi samtempe pecon de historio ».

III.

Ne nur pro sia beleco, sed ankaŭ pro sia granda kultura estinteco estas konata kaj fama nia Praha, iam la plej superanta kaj la plej domriĉa urbo de l' meza Eŭropo, dum la tempo de Karolo IV^a sidejo de la unua mezeŭropa universitato kaj de la unua botanika ĝardeno, kaj dum Rudolfo II^a urbo kun la plej multekostaj kolektoj artistaj, kaj pro la brilo de sia kortego kaj pro la ĝuoj, kiujn ebligis « la Parizo de l' meza kaj norda Eŭropo ». Tie ĉi en bohema lingvo estis eldonata la unua gazeto de l' tuta mondo. Ĝi estas ankaŭ loko de la unua sisteme aranĝita kaj laŭ preciza programo efektivigita ekspozicio (en jaro 1791), kaj la unua sidejo de lernejo politeknika en Eŭropo ĝenerale.

Ĉi tie, kaj speciale por la muzikamantaj Prahanoj, estis komponata « Don Juan » de Mozart, kies signifo en la historio de muziko estas vere epokfaranta aperaĵo.

* *

Kaj tamen Praha ĝis nun, en multaj rilatoj, partoprenas la sorton de urboj vivantaj el la gloro de pli bonaj kaj longe pasintaj tempoj.

Praha ĉesis esti restadejo de siaj reĝoj kaj objekto de zorgemoj de aŭstria registaroj.

El ĝiaj muroj de longe malaperis la ĉion viviganta vicleco kaj vivo de restadeja urbo, kaj per tio ankaŭ la alfluado de fremdlandaj gastoj.

Kalumniita per koto de ofendaĵoj, mortigata ekonomie kaj finance, jam ĝi ŝajnis partopreni en la sorto de aliaj, kvankam famaj, sed de longatempaj forlasitaj, mortantaj urboj de Eŭropo: de Ravenna, Aquileja, Brugge, Gent, Avignon kaj Venecio.

Sed jen la fermentanta interna forto kaj potenco de l' vigla nacio, fiera pro sia glora estinteco, ambicia kaj memkonscia, ne permesis al Praha malleviĝi sur tiun ŝtupon!

Mem dia Providenco preparis al ĝi alian, pli bonan sorton!

Ankoraŭ je la komenco de sesdekaj jaroj de la pasinta centjaro neniu — eĉ en regno Bohemujo, des malpli en Aŭstrio — atendis, eĉ antaŭsentis la nunan ekfloron de Praha.

Sed kio eĉ al niaj plej varmaj entuziasmoj ŝajnis esti nur sonĝo, tio ne restis kaŝita al sagaco de granda observanto fremda. Ĝi estas denove la fama Violet le Duc, kiu antaŭ kvindek jaroj — tio estas en tempo de plej granda persekutado de nia nacio, dum absolutista tempo de Bach — jam antaŭsentas la estontan gloron de Praha, kaj vidas en ĝi urbon de granda ekfloranta nacio, ekkriante: « Sed Praha estas ĉefurbo, en kiu estas sentebla la forto kaj potenco de granda popolo! »

Kaj ĉi tiuj efektive profetaj vortoj realiĝis. Praha leviĝis kaj denove ekfloris!

Per propra forto, sen fremda helpo, kvazaŭ spite ĉiuj, per penemo de siaj plej bonaj filoj ĝi ekfloris kiel rozo de Jeriĥo, mirakle en ĉarma floro, en sia tuta estiinta beleco kaj majesteco.

Ĝi fariĝis ne nur ĉefurbo de ĉiuj landoj de la krono de Sankta Vaclavo, sed eĉ kultura centro de ĉiuj branĉoj de ekfloranta, kaj al plej altaj ŝtupoj de civilizo kaj kulturo penadanta, nacio ĉeĥoslava; ĝi fariĝis eĉ fokuso de floranta arto.

Ne estas malproksima la tempo, kiam sur vojo de duobl-iginta laboremo, de disciplino kaj penemo, de disvastiĝo de artoj, — ne fremdaj, sed propraj, pure bohemiaj — sen perforto kaj sen renversoj, per armiloj de spirito — la bohema nacio regajnos al nia reĝa Praha tian valoron kaj brilon, pri kia nur revadis tutaj generacioj de niaj patroj, eĉ de du pasintaj centjaroj.

El bohema lingvo tradukis,
JAROSLAV SITKO.

Multenombraj esperantistaj gekongresanoj dezirus sendube viziti la belan urbon ĵus priparolitan. Ni rememorigas, ke la vojaĝo de Dresdno al Praha daŭras nur 3 1/2 horojn. En Praha estas farataj ĉiuj aranĝoj por la loĝado de l' kongresanoj, al kiuj oni vizitigos la Jubilean Ekspozicion kaj la ĉefajn kuriozaĵojn. Por sciigoj oni skribu al:

Esperanta konsulejo esperantista
Praha II., Truhlářská 1518-27.



LA PLEJ GRANDA PREĜEJO TYN.



KVARTALOJ HRADČANY KAJ MALA STRANA.



PRI ESPERANTO

Ĉirkaŭ la Kvara.

PROGRAMO DE L' KUNVENOJ KAJ FESTOJ: 15 — 23 DE AŬGUSTO 1908.

Sabato, 15^a. *Matene 9 h.*: Malfermo de la akceptejo kaj de la ekspozicio; ambaŭ en « Technische Hochschule ». — Preparaj kunvenoj de la Organiza kaj Lingva Komitatoj.

Vespere 8 h.: Amika kunveno en la Dresdena Grupo. — Muzikaj kaj teatraĵoj.

Dimanĉo 16^a. *Matene*. Diservoj 10 h.: Luther'a. 11 1/2 h.: katolika.

Posttagmeze 1 h.: Tagmanĝo. — 3 h.: Elektro de naciaj delegitoj. — 4 h.: Amika kunveno en la « Granda Reĝa Ĝardeno ». *Vespere 8 h.*: Propagandaj paroladoj, lumbildoj.

Lundo 17^a. *Matene*. Alveno de Doktoro Zamenhof. — 10 1/2 h.: (*precize*): Oficiala malfermo de l' Kongreso.

Posttagmeze 1 h.: Tagmanĝo. Poste fakaj kunsidoj.

Vespere 8 h.: Ĝardena festo en la arta ekspozicio.

Mardo 18^a. *Matene 9 h.*: Unua agada kunsido.

Posttagmeze 12 h.-1 h.: Tagmanĝo. — 1 h. 20 m.: Ekskurso al Meissen per vaporŝipo. Vizito de l' kastelo de Albrecht kaj de la reĝa fabrikejo de porcelano.

Vespere: Kunveno en la Geibelburg, en Meissen. Internacia komedio. Reveno per specialaj vagonaroj.

Merkredo 19^a. 9 h.: Agada, poste fakaj kunsidoj.

Posttagmeze 1 h.: Tagmanĝo. Poste fakaj kunsidoj.

Vespere 8 h.: Prezento de Ifigenio en

Taurido — Por la nepartoprenantoj, diversaj lokaj aranĝoj.

Ĵaŭdo 20^a. *Libera tago*. Komuna ekskurso per vaporŝipo en la Saksan Svisujon. Fotografado de l' kongresanoj. « Marktfest » Historia foirfestoj en la urbo Wehlen.

Vendredo 21^a. *Matene*. Kiel merkredo. *Posttagmeze 1 h.*: Tagmanĝo. Poste fakaj kunvenoj.

Vespere 8 h.: Koncerto kun afabla helpo de famaj membroj de la Dresdena Opero. — Poste balo kun naciaj kostumoj.

Sabato 22^a. 9 h.: Malfermo de la kongreso. — 2 1/2 h.: Festo de la Revuo. — *Vespere*: Diversaj aranĝoj.

Dimanĉo 23^a. Vizito al « Weisser-Hirsch » kaj festo en la esperantista vilaĝo.

Estas bedaŭrinde, ke tiu tre alloga programo estis tiel malfrue konata, ĉar ni konas multe da personoj, kiuj projektinte, komence, ĉesti la kongreson, decidis alian uzon de sia libertempo pro nescio pri la kongresaj aranĝoj.

Estas rimarkinde, ke, krom la teatra prezentado, la kongresa bileto rajtigas por ĉiuj kunvenoj, festoj, ekskursoj, eĉ por senpaga uzo de la tramveturiloj en Dresdno, tre oportuna utilo en granda urbo.

La kunsidoj okazos en komfortaj ĉambregoj kaj salonoj de la Tehnika Lernejo; escepto estos farata por la malferma kunsido, kiu okazos en vasta halo de « Vereinhaus », por solena akcepto al D^{ro} Zamenhof kaj al la gekongresanoj, de la urbestro, kelkaj ŝtatministroj, la fremdlandaj konsuloj, k. a.

Pri la loĝado kaj manĝado, la jenaj aranĝoj estas farotaj. Oni vendas kaĵeron po 6 biletoj je la prezo de 37 fr. 50 (15 Sm.), rajtigantan por loĝado en privata domo aŭ hotelo kun « kafo » frumatene, kaj por 6 tagmanĝoj en Dresdno ĉe komuna tablo je 1^a h. posttagmeze. Tiu tagmanĝo okazos en la « Theater-Tunnel » (keletaĝa restoracio), loko agrabla dum la varmegaj kongresaj tagoj. Por la vespermanĝoj, se eble sed ne certe, simila organizo estos farata.

Pri la vojaĝo, ne malmulte grava afero, oni ne parolas. Felice por vi laboris, karaj legantoj, la nove naskiĝinta « Universala Esperanto-Asocio », kaj la aranĝoj faritaj aŭ baldaŭ farotaj de tiu Asocio donas bonegan okazon, ĝin prezenti al vi.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Post diversaj klopodoj, la *Universala Esperanto-Asocio* estas nun oficiale fondita. La provizora regularo ĵus estas akceptita de la delegitoj kaj la komitato rajtigita. La celo de tiu nova, por nia movado tre grava organismo, estas la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj. Por tio ĝi organizas per Esperanto diversajn internaciajn praktikajn servojn, tiuj uzablajn de la personoj, kiuj vojaĝas, korespondas, komercas, rilatas kun alilingvanoj pri ĉiaj fakoj. Ĝi klopodas por starigi, en kiel eble plej multe da lokoj, konsulojn, Esperanto-Oficejojn, kiuj helpas al la vojaĝantaj samideanoj; ĝi organizas vojaĝojn, ekskursojn, esperantistajn libertempajn koloniojn, hotelojn, k. t. p., unuvorte klopodas per ĉiuj rimedoj por enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon kaj por la internacia uzado de nia lingvo.

La organizo de la U. E. A. estas starigita sur la jena plano: en ĉiu loko, kie tio estas ebla, estas *Delegito*, elektata nun de la grupoj aliĝintaj, poste nur de la U. E. A. anoj. La *Delegito*

reprezentas la komitaton, zorgas pri la interna administrado de la Asocio en sia regiono, klopodas por starigi en sia loko la servojn ĉie organizatajn de la U. E. A. Li mem elektos sian anstataŭanton, siajn helpantojn, kiuj laboros por la funkciado de la diversaj fakoj, ĉiu laŭ sia specialeco, kaj *subdelegitojn*, kiuj en ĉiuj ne grandaj lokoj de lia regiono reprezentos la delegiton, kaj lin helpos por la plenumo de lia tasko. La Komitato, elektita de la delegitoj, estas dividita laŭ diversaj fakoj, por kies zorgado estas komisiitaj unu komitatano kaj helpkomitatanoj, nome: fako 1^a *Administrado*; fako 2^a *Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj*; fako 3^a *Turismo*.

Estas anoj de la U. E. A. ĉiuj anoj de la organizaĵoj, kiuj elektis aŭ elektos delegitojn. Ial oni havas la rajton senpage uzi la servojn organizitajn de la U. E. A. Plie, ĉiuj anoj, kiuj pagas la malkaran kotizaĵon difinitan de la regularo (24 Sd.) ricevos membrokarton, kiu donos al ili la rajton plendi, se ili ne ricevis la servojn, kiujn ili rajtas.

Jam ekzistas Delegitoj en 97 lokoj diversregionaj. Post la fondo de la U. E. A. estas nedubeble, ke multaj grupoj, societoj, k. c., kompreninte la praktikan signifon de tiu organizaĵo por nia afero, deziros partopreni en ĝi kaj elekti delegiton. Ĉirkulero pri tio estas nun dissendita al ĉiuj ekzistantaj organizaĵoj, kiuj estas petataj respondi ĝin kiel eble plej baldaŭ. La grupestraroj, kiuj ial ajn ĝin ne ricevis, bonvolu skribi al Esperanto, Genève (Svis.), 6, rue Bovy-Lysberg.

La Komitato de la U. E. A. konsistas el: S^{roj} H. Bolingbroke Mudie, prezidanto; H. Hodler, vicprezidanto; A. Carles, Th. Rousseau, R. Mesny, S. Meyer, P. Blaise, J. Schmid, D^{ro} Whitaker, anoj.

Kiel oni vidas la afero iĝis nur pure praktika, kaj sur tia kampo mi estos ĉiam kunsenta kun S^{roj} H. Hodler, instiginto de tiu utila kreo. Niaj legantoj memoros, ja, ke dum momenta malapero de « Esperanto-Journal » post la Geneva Kongreso, « Tra la Mondo » estis la parolportilo de nia bonega amiko T. Rousseau, iniciatinto de la Esperanto-Oficejo, kunkreinto de U. E. A. kaj homo praktikema kiel ni. La U. E. A. celas iĝi kvazaŭ universala franca Turing-Klubo, kaj, por komenci, kaj pravigi tiun diron, ĝi organizas 4 arajn vojaĝojn al Dresdno por la jenaj Eŭropaj partoj: sud-okcidenta, okcidenta kaj centra, Brita, Skandinava. La loĝantoj de aliaj regionoj kaj de ekstereŭropaj povos, kompreneble, partopreni en la vojaĝoj ĉe konvena haveno aŭ stacidomo.

Ni multe konsilas, ke oni legu la numeron 32^{an} (1^a Junio 1908) de « Esperanto » kaj sekvontajn, por plene sciigi pri tiuj bonegaj aranĝoj.

A. MONTROSIER.

KRONIKO.

De ĉiuj landoj alvenas al ni la plej kontentigaj sciigoj pri nia senhaltala progresado. Unua atesto estas la konstanta pli-riĉigo de nia gazetaro (vidu aliloke). Alia estas la kreskanta intereso de la nacia gazetaro, pri raportata de niaj propagandaj kunfratoj. En Germanujo, tio ĉi estas aparte rimarkinda; « *Germana Esperantisto* », kiu ĝojas pri la simpatio nuna de multaj germanaj folioj, povas prave pro ĝi fieriĝi. Kelkaj organoj havas nun specialan Esperantan rubrikon; « *Sheffield Weekly News* », ekzemple, pri tiu fako atentigas siajn legantojn per la grandlitera vorto « Esperanto ». apud sia titolo.

Tre rimarkindaj ankaŭ estas la aliĝoj de eminentuloj ĉiuklasaj al nia afero: en Rumanujo: reĝino Elizabeto, generalo Demosthen, generalo-kuracisto, kiu igis favora la militministron; en Dresdeno, ni havos tute oficialan akcepton ŝtatan kaj urban. En alia parto de tiu ĉi numero oni legos alvokon de la Brazila Ligo pri la Tutamerika Scienca Kongreso; nu, per cikulo de la *Societo patrino esperantista de Ĉilio*, ni ĝoje eksciis la aliĝon de la jenaj eminentaj personoj: S-roj Valentin Letelier, rektoro de la Ĉila Universitato kaj prezidanto de la organiza komitato de la kongreso; Eduardo Poirier, plenpotenca ministro de Guatemala, dekanato de l' Diplomatia korpo en Ĉilio, ĝenerala sekretario de l' kongreso; Miguel Cruchaga T., eksterordinara ambasadoro kaj plenpotenca ministro de Ĉilio apud la Argentina registaro, vic-prezidanto de l' kongreso; Eduardo Fábres, profesoro de legoscienco ĉe la Ĉila Universitato. Dank' al tiuj eminentuloj, kaj al la klopodoj de anoj de l' Ĉila societo: Sin^o Errázuriz de Santa Cruz, S-roj Ipolito K. Kontreras (redaktoro de Ĉilo Esperantista) kaj Augusto Biant, ĝenerala konsulo de Esperanto en Ĉilio, *Esperanto estas metita inter la temoj, pri kiuj speciale sin okupos la granda Scienca Kongreso Tutamerika.*

Ĉiuj, kiuj ĝin povos, konigu tiun sciigon, kaj agadu por esperantemigi la naciajn delegitojn, sin informante pri la nomoj de tiuj ĉi.

Alia rezultato rilata al kongreso: En Montceau-les-Mines (Francujo), la nacia kongreso de l' ministoj unuvoĉe decidis, inviti la laboristajn sindikatojn, krei ĉie Esperantajn kursojn, kaj enkondukis en la tagordon de l' kongreso de Lens la demandon pri la lingvo internacia. (El « *Le Journal de Beaune* »).

En la militaj rondoĵoj la aliĝoj ankaŭ multiĝas.

La franca societo *Esperanto-Ruĝa-Kruco* definitive organizis sin la 24an de Majo; en la komitato havas lokon la jenaj altrangaj militistoj: Vic-Admiralo Bayle, generalo Sebert, generalo Prion, unuaklasa militadministracia revizoro Acary. Sidejo ĉe Centra esperantista Oficejo, 51, rue de Clichy. La societo penados interrilatiĝi kun similaj fremdaj organizaĵoj, kaj eldonos duonjaran organon.

Por kompletaj sciigoj sin turni al la sidejo.

Ĵus ni sciigas de « Internacia Scienca Oficejo », ke, laŭ instigo de D^{no} René de Saussure, ĝenerala sekretario de « Esperantista Scienca Asocio » kaj Direktoro de nia bonega kunfrato « Internacia Scienca Revuo », la Internacia Komitato de Ruĝa-Kruco decidis, sendi oficialan delegiton al la « Kvara ». Ni gratulas nian distingindan samideanon pro tiu bonega rezultato.

Ankaŭ la *esperantista marista ligo* estas organizita, sub honora prezidanteco de vic-admiralo Bayle, kaj enhavas vic-admiralon Gigou en sia anaro. La prezidanto estas hidrografista ĉefingeniero Rollet de l' Isle, la sekretario R. Mesny. Grandville (Manche), Francujo.

Nova valora aliĝo estas tiu de generalo Wood, tutmonde konata, eksguberniestro de la insulo Cuba (Kuba). Veturante al Eŭropo, kie li reprezentos Usonon ĉe la ĉefaj eŭropaj militmanovroj, sur la sama ŝipo kiel nia fervora samideano Dro Yemans, li akompanis tiun ĉi dum la vizito al la esperantistaj grupoj, kaj estis tre frapata de tio, kion li vidis kaj aŭdis, kaj li intencas klopodi por enkonduki oficiale Esperanton en la militajn lernejojn.

Ĉiuj usonaj konsuloj, en Genevo ankaŭ la usona ministro, sendos favoran raporton. Kiam aperos tiu numero, Doktoro Yemans estos veturanta al Washington por subteni persone la proponon; kaj, por favorigi la personojn, de kiuj dependas la decido, li multe konfidis al la rimarkinda artikolo de S-ro Shuster, kiu tiel bonege montras la admirindajn penadojn de la Usona Registaro, por instrui kaj moraligi sian novan posedaĵon. Por ĉiuj esperantistoj, tiu artikolo verkita de Ministro de Edukado, speciale por Esperanta gazeto, estas bonega propagandilo.

STELETO.

NIA ENKETO PRI ENKETO.

Ni ricevis sufiĉe da respondoj, sed la plimulto ne plenumis la programon proponitan. Vere niaj samideanoj havas imagon, ĉar la plej neatenditaj proponoj estis iafaje farataj, sed ili ne havas tiom da metodo, ĉar ĝenerale ili kontentigis sendante titolon sen la postulita demando.

Inter la plenaj respondoj ni konservis la jenajn, kiuj sajnvis al ni la plej atentindaj:

- 1^o — La batalado antipornografia, proponita de S-ro Durieux, kun zorga demando, kaj de 11 aliaj personoj nekomplete.
- 2^o — Pri diversnaciaj infanaj ludoj, de R. Frenkel, el Enisejsk.
- 3^o — Nuna stato de la kontraŭalkohola propagando en la diversaj landoj, de S-ro P. Dejean.
- 4^o — Pri la rolo de modernaj armeoj dum la paco, de S-ro Sam. Meyer.
- 5^o — La emo al la migradoj kaj vojaĝoj diverslande, de S-ro L. de Guesnet.
- 6^o — Pri la salajroj de la geedukistoj, de S-ro P. Gillet.
- 7^o — Gramatika enketo de S-ro Tellini el Udine.

Premioj. — 1^a S-ro Durieux. 4 serioj da 3 sinsekvaj numeroj de 4 malsamaj esperantistaj gazetoj (riceveblaj kontraŭ 75 c.) kaj 2 kvaronjaraj abonoj al « *Tra la Mondo* » 2^a S-ro Frenkel. 1 ekzemplero de « *Tra Mez Afriko* » (kontraŭ 75 c.), kaj 1 jar-kvarono de « *Tra la Mondo* ». 3^a S-ro P. Dejean. 2 gazetaj serioj.

Oni povas elekti inter la jenaj gazetoj: *L'Espérantiste*, *la Belga Sonorilo*, *Germana Esperantisto*, *Esperanto-Journal*, *Casopis Českých Esperantistu*, *Suno Hispana*, *Esperantisten*, *Japana Esperantisto*.

Dezirante helpi al la propagando ĉe la infanoj per geedukistoj, ni tuj komencas la 2an enketon, kaj donos la demandon pri la unua temo, kiun ni opinias tre grava, en nia sekvanta numero.

Enketo pri Diversnaciaj Infanaj Ludoj.

(Popolaj, familiaj kaj lernejoj).

ANTAŬPAROLO.

Ĉar mi intencas fari kolekton da diversnaciaj infanaj ludoj, mi tre petas ĉiujn esperantistojn, sendi al mi priskribojn de la ludoj konataj de ili, naciaj aŭ plej amataj en ilia lando. Se eble oni nepre aldonu fotografajojn aŭ desegnaĵojn klarigantajn ilin. La plej interesaj estos presataj, (*precipe akompanataj de ilustraĵoj*) sub mia redaktado, en « *Tra la Mondo* », por kio la nomita gazeto tre afable donis sian konsenton. Por komenci, mi priskribos du ludojn, tre amatajn kaj disvastigitajn inter la rusaj infanoj.

La unua el ili estas tiel konata kaj amata en Rusujo, precipe en vilaĝoj kaj malgrandaj urboj, ke la fama rusa pentristo V. E. Makovskij prenis la ludon « *Babki* » kiel temon por unu el siaj ĉarmaj pentraĵoj, kies kopion prezentas la aldonota ilustrita poŝtkarto.

Oni sendu la manuskriptojn laŭ adreso: *Enisejsk*, Rusujo, Siberio. Al S-ro R. Frenkel, inspektoro de gimnazio.

R. FRENKEL

JUS APERIS.

Ĉe *Preso Esperantista Societo*: Plej gravaj ĉefverkoj de la Eŭropaj Muzeoj; albumo da dek poŝtkarto kun kromfolioj: 1 fr. Esperantaj perleroj (aforismoj, proverboj, poezioj). 3 broŝuretoj, ĉiu 30 cent.


Ĉe *British Esperanto Asocio*: Gvidlibreto de Edinburgo. 4 Sd, de J. Robbie, kun multaj ilustraĵoj.

Ĉe Vaclav Riegel en Praha — Il — 1687 (Bohemujo: *Slovakoj kaj magaroj*, de H. K. Bonška, kun petskribo al barono Alois Aehrenthal, ministro de l'eksterlandaj aferoj en Aŭstria-hungaria imperio. 50 hel.

Ĉe « *Friedens-Warte* »: Broŝuro kun titoloj de 1000 *jurnal-artikoloj* publikigitaj de S-ro Alfred H. Fried, direktoro de « *Friedens-Warte* », pri pacifismo. Prave nia samideano povas esti fiera pro tia agemeco, kiu ekzercigis en 95 diversaj organoj el 7 malsamaj landoj.

Bulletin annuel du groupe espérantiste de Beaune, enhavanta interesajn sciigojn pri la rimarkinda agado de la grupo, praktikajn sciigojn, k. t. p. (10 c. = 4 sd. ĉe S-ro Esperanto-Oficejo, Beaune, Francujo).

Pro la troeco de presaĵoj, ni ne povas enpresii hodiaŭ la artikolojn *Mektub kaj Skola lingvo kaj Esperanto*, anoncataj sur nia kovriljo; nek ankaŭ la enketon de S-ro Rollet de l'Isle.



GESTUDANTOJ EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.

Lernejoj Publikaj en la Filipina Insularo

de W. MORGAN SHUSTER, Sekretario de Instruado Publika.

Unu el la unuaj agoj de la Estraro Amerika Civila, en la Filipina Insularo, estis starigi vastan planon pri sistemo de senpagaj lernejoj publikaj, kaj komenci laboradi laŭ tiu ĉi plano. La sistemo ekintencita estis iomete pli vasta ol tio, kion la spezoj de l'Estraro povis subteni. Ĝi intencis, doni al ĉiu infano de lerneja aĝo en la Insularo, senpagan, komunalernejan edukadon. Estis speciale dezirite, doni al la popolaj amasanoj malpli riĉaj, oportunojn por akiri edukitecon.

Ce tiu epoko, la Estraro Civila posedis nek lernejojn nek instruistojn. Estis necese, konstrui tiujn, kaj fari komencon per venigo de tiuj ĉi de la Unuiĝitaj Statoj. En la jaro 1901, pli ol mil instruistoj usonaj estis enkondukataj en la Insularon. Diversaj konstruaĵoj Estraraj estis aliformigataj en lernejojn; aliaj konstruaĵoj estis luitaj, kaj la konstruado de aliaj ankaŭ komencita.

Estis decidite, ke la Filipinanoj, estos instruataj en la angla lingvo. Multaj kaŭzoj influis tiun ĉi elekton; la ĉefa inter ili estis la fakto, ke nur malgranda procento da Filipinanoj parolas la lingvon hispanan; kaj la gepatraj lingvoj tiom malsimilas, ke homoj, kiuj parolas iun lingvon, ne povas kompreni tiujn, kiuj parolas alian.

Decidinte, fondi senpagajn, publikajn lernejojn en la Filipina Insularo, la Estraro havis por konsideri kaj solvi la sekvantajn problemojn:

1. Decidigi la Filipinanojn, ke ili subtenu kaj ĉeestadu la publikajn lernejojn;
2. Decidigi ilin, ke iliaj infanoj lernu anglon;
3. Konstrui lerneajn domojn;
4. Havigi kompetentajn instruistojn amerikajn, sufiĉe patrujamaj por veni al la Filipina Insularo por la malaltaj salajroj, kiujn oni povus proponi al ili;
5. Trafi, ke la instruistoj amerikaj faru instruistojn en la angla lingvo el la Filipinaj knaboj kaj knabinoj.

La du unuaj el tiuj ĉi problemoj ne estis speciale malfacilaj. Al la ĉiama merito de la Filipina popolo estu dirata, ke tuj, kiam ili komprenis tion, kion signifas edukado por sia infanaro, la granda plimulto el ili donis sian subtenadon al la lernejoj publikaj.

La problemoj, sia provizi je lerndomoj estis nur mona kaj tempa.

La problemoj, varbi sufiĉan nombron da instruistoj amerikaj, estis ja kreskante malfacila. De la ekkomenco estis evidente, ke, se ia progreso estus farota, donante senpagan edukadon ekster la provincaj ĉefurboj kaj grandaj urboj, la instruistoj estus, necese, eltirotaĵoj el inter la Filipinanoj mem. Estus, ja, neeble, varbi sufiĉan nombron da lernejestroj amerikaj, por fondi la trimil lernejojn, kiuj estis intencitaj; nek estis mono havigebla por pagi pli ol kelkajn el ili. La rimedo, tial, kuŝis «fari» in-



UNU EL LA KLASĈAMBROJ (MUZIKEJO) EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.

struistojn, samtempe, kiam la kutima lerneja laborado estos elvolvata.

Tiel sukcesplene tio ĉi fariĝis, ke, nuntempe, estas pli ol sesmil gejunuloj Filipinaj instruantaj en la lernejoj publikaj. Oni devas memori, ke ili instruas per la angla lingvo, kies eĉ unu vorton apenaŭ unu el ili konis ok jarojn antaŭe. Iliaj salajroj estas de sesdek ĝis sescent dolaroj jare; en mono de Unuigitaj Ŝtatoj dolaro egalvaloras iomete malpli ol 2 spesmiloj. La instruistoj en la malgrandaj vilaĝoj,

aŭ « barrios » (Hisp. kvartaloj de urbo, aŭ ĉirkaŭurboj) ricevas tre malaltajn salajrojn; tiuj en la provincaj ĉefurboj ricevas pli altajn salajrojn.

La instruistoj amerikaj, nuntempe, estas ĉirkaŭe okcent. Ili instruas ĉe la Normala Lernejo (lernejo, en kiu la lernantoj studas por fariĝi instruistoj), ĉe la superaj lernejoj en diversaj provincoj, ĉe la industriaj kaj terkulturaj lernejoj, kaj en la pli altaj gradoj de l' intermezaj lernejoj. Ili ankaŭ agas kiel « supervidantoj » (inspektoroj) en la plimulto el



EN LA ĜARDENO DE L' TERKULTURA LERNEJO, ILOILO (PANAY INSULO).



EN LA SAMA TERKULTURA LERNEJO.

la tricent sepdek naŭ «lernejaj distriktoj», en kiujn la Insularo, escepte la Moro'ajn Provincojn, estas dividita.

Kiel inspektoroj, ili estas devigataj fari vizitojn oftajn al la centraj urbaj kaj vilaĝaj lernejoj, interne de siaj respektivaj lernejoj limoj, kaj instrui la filipinajn instruistojn pri ilia laborado; ekzameni la lernejojn, kaj esplori la progresadon de l'infanaro.

De la Departemento de Instruado Publika dependas Oficejo de Edukado, kun centra Oficejo lokita en Manila. Estas tridek sep «lernejaj divizioj», ĉiu entenanta unu, aŭ pli, provincon. Ĉiu lerneja divizio estas dividita en «lernejajn distriktojn», kiuj, kiel estas jam dirite, estas tricent sepdek naŭ.

La granda plimulto el la publikaj lernejoj konsistas el tiuj, kiujn oni nomas «elementaj lernejoj». La kurso elementa daŭras kvar jarojn, kaj entenas legadon, skribadon, aritmetikon, geografion, gramatikon kaj simplan, industrian aŭ manan dreslaboron. Estas preskaŭ trimil kvincent da tiuj ĉi lernejoj nune en funkcio tra la tuta Filipina Insularo. La meza nombro de P infanoj, kiuj ĉeestas la lernejojn, laŭ monata kalkulo, dum la pasinta lerneja jaro estis ĉirkaŭe 333,000. En la elementaj lernejoj, praktike ĉiuj instruistoj estas Filipinanoj.

De la elementaj lernejoj, la infanaro pasas en la intermezajn lernejojn, da kiuj estas, nuntempe, cent sesdek du en la Insularo. La kurso intermeza daŭras tri jarojn, kaj entenas instruadon pli kompletan pri aritmetiko, gramatiko, geografio, historio, regado, angla verkado kaj elementa botaniko kaj zoologio.

Post la intermeza kurso, la lernantoj pasas en la duagradaĵajn, aŭ altajn lernejojn, da kiuj estas tridek ses en la Insularo — praktike, unu por ĉiu provinco.

La altaj lernejoj estas lokitaj en la ĉefurboj provincaj. La kurso daŭras kvar jarojn, kaj entenas algebron, gramatikon, historion, kolonian regadon, latinon, geometrion, hispanon, botanikon, hemion,

fizikon (natura sciencojn), fiziologion, desegnadon kaj diversajn aliajn specialajn branĉojn (fakojn).

Krom la antaŭcititaj, funkcias ankaŭ nune tridek lernejoj de artoj kaj metioj, kvin terkulturaj lernejoj kaj deksep hejmsciencaj lernejoj.

Granda atento estas donata al la instruado pri tiuj fakoj. Oni intencas multe pligrandigi la nombron kaj gravecon de tiuj ĉi specialaj lernejoj; kaj nur la ĝisnuna neebleco, havigi sufiĉan nombron da lernejestroj industriaj kaj terkulturaj el la Unuigitaj Ŝtatoj, malprosperigis la penadojn, por malfermi pli da tiuj ĉi specialaj lernejoj.

Dum la pasinta jaro, simpla industria laborado estis farata deviga en ĉiuj el la elementaj gradoj. Oni instruas la knabojn pri teksado, ĉapelfarado, desegnado, elementa terkulturo, ligna prilaboro (ŝipa kaj ĉarpenta), elementa potfarado kaj masonado, kaj la fabrikado de ŝnuregoj, ŝnuraĵo, balailoj, brosoj, k. t. p. La knabinoj estas instruataj pri teksado, kudrado, kuirado, kolorigado, blankigado, ĉapelfarado kaj potfarado.


Oni instruas pri muziko en ĉiuj el la lernejoj; kaj kantado estas unu el la ĉefaj karakterizaĵoj inter ĉiuj lernejaj ekzercadoj kaj amuzaĵoj.

En la hejmsciencaj lernejoj, la knabinoj estas instruataj, por fariĝi kuiristinoj kaj mastrinoj, igi hejmojn allogaj, kaj, super ĉio, pri la ordinaraj leĝoj de sanado kaj higieno.

En Manila estas Insulara Lernejo de Artoj kaj Metioj, kun tricent kvindek lernantoj; kaj atendas pli ol ducent petantoj enskribitaj, por kiuj nek instruistoj nek akomodaĵoj estas ĝis nun havigeblaj.

La lernejo posedas modernan maŝinaron kaj ilaron, kaj oni donas en ĝi instruadon pri anglo, aritmetiko, geografio, mehanika desegnado, ligna prilaborado (stablalaborado, skulptado, tornado kaj meblofarado), ferprilaborado (stablalaborado, fajlado, forĝado kaj fera maŝinalaborado, kaj finado —

(1) Moros — Hisp. = Maŭroj; gento de duonsovaĝuloj, kiu enloĝas la insulon Mindanao'n; tiuj homoj estas Mahometanoj.



LIGNALABOREJO EN LA LERNEJO DE ARTOJ KAJ METIOJ, MANILA.


entenanta pentradon kaj lakadon). La proksima jaron, instruado estos donata pri la, plej malfacilaj, boatkonstruado kaj radfarado.

En tiu ĉi lernejo, la knaboj filipinaj estas preparataj fariĝi industriaj instruistoj, ĉar, eventuale, la aro da industriaj instruistoj devos elveni el inter la Filipinoj mem.

Planoj nun estas alprenitaj por starigi grandan In-

sularan terkulturan lernejon apud Manila, por doni instruadon pri praktika terkulturo. La konstruaĵoj kaj ilaro kostos, proksimume, 100.000 spesmilojn, kaj tiu ĉi sumo estas sub la mano. Sublernejoj de terkulturo estos ankaŭ fondataj ĉe iu loko, pli alirebla por la homoj de l' suda parto de l' Insularo.

En Manila estas, ankaŭ, Normala Lernejo, kie ĝe-
junuloj Filipinoj estas pretigitaj, por instrui. En



DESEGNA ĈAMBRO EN LA LERNEJO DE ARTOJ KAJ METIOJ, MANILA.



HEJMSCIENCA LABORATORIO EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.

kunigo kun tiu ĉi lernejo, kurso por flegistinoj estas fondita, en kiu junulinoj ricevas praktikan instruadon pri la zorgo de l' malsanuloj, pri la pli-simplaj metodoj por malhelpi malsanojn; kaj tre zorgplena kaj plenegan instruadon pri la reguloj de hejma higieno. La Estraro estas fondinta dek senpagajn stipendiojn por tiu ĉi celo, kaj ili estas aljuĝataj al dek junulinoj Filipinaj post konkursa ekzameno; ne pli ol unu senpaga stipendio estas aljuĝebla en ĉiu provinco. Dek kvin junulinoj

partoprenas, nuntempe, tiun kurson, kaj ĝi estos, kredeble, etendata, tiamaniere, ke ĝi fariĝos plenan kurson de instruado por flegistinoj, kun ĉiuj pliperfektigoj.

Funkciis antaŭe en Manila Marveturarta Lernejo de kiu kelkaj junuloj jam estas diplomitaj; tamen, kun la nunjara gradiĝa klaso, la lernejo estos fermata, por la nuna tempo, kaj, la venontan jaron, kaj ĉiun sekvontan jaron, post tiu ĉi, dek junuloj, elektotaj per taŭga konkursa ekzameno,



INSTRUISTINOJ KAJ LERNANTINOJ (TIELANDE VESTITAJ) EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.



NATURHISTORIA LABORATORIO POR AMBAŭ SEKSOJ EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.

estos sendataj en la Unuigitajn Ŝtatojn, por esti tie instruataj, sur lernejoŝipoj.

La Estraro ankaŭ subtenas kelke da Filipinoj, kiel Estraraj studentoj, en la Unuigitaj Ŝtatoj. Ili estas nomitaj post konkursaj ekzamenoj, kaj estas tute subtenataj de la Estraro dum siaj kvar aŭ pli jaroj da edukado, tie. Dum la pasinta jaro, estis cent okdek ses da tiuj studentoj en la Unuigitaj Ŝtatoj, el kiuj dek ok studadis leĝosciencan; kvindek tri, inĝenierosciencan; dudek ses, terkulturadon; kvardek kvin en normala lernejo por fariĝi instruistoj; dekdu, medicinon; tri en komercaj kolegioj; kaj dudek naŭ, arĥitekturon, muzikon, sciencan, arton, litografarton kaj diversajn aliajn fakojn.

Kiam ili ricevis diplomon de la lernejo, kolegio aŭ universitato, tiuj ĉi studentoj estas devigitaj reiri al la Insularo Filipina, kaj akcepti oficon sub la Estraro. Kvardek ses studentoj revenis, antaŭ ne longe, kaj okupas situaciojn dependantajn de la Oficejo de Edukado.

En Junio pasinta, la Universitato de Medicino Filipina, senpaga lernejo Estrara, estis malfermata en Manila. Ĉiuj studentoj estas devigitaj plenumi severegan eniran ekzamenon. Ĉar ĉeestado ĉe tiu ĉi lernejo postulas, ke la studanto loĝu en Manila, la Estraro fondis samtempe, por ĉiu provinco en la Insularo, unu senpagan stipendion ĉe tiu ĉi lernejo, aljuĝotan post konkursa ekzameno. La sukcesintaj konkurantoj estas transportataj senpage ĝis Manila, ricevas monon por nutraĵo kaj subtenado, maksimume 500 spesmilojn jare dum la ĉeestado en la lernejo.

Post la ricevo de la diplomo kiel Doktoro de Medicino, ili estas retransportataj hejmen. Ĉiu senpaga studento devas kontrakti, ke, escepte se li akceptos ian oficon sub la Estraro, li revenos en sian provincon, kaj praktikos la medicinon kaj ĥirurgion dum periodo da tempo, almenaŭ egala al tiu, dum kiu li ĉeestadis la medicinan lernejon. La


celo de tiu ĉi kondiĉo estas garantii kuracistojn en la provincoj, kie ja, estas nune neniu kuracisto, pro kio la granda plimulto el la homoj tie naskiĝas kaj mortas, ne ricevante atenton medicinan nek ilegojn.

Dum tiu ĉi jaro, la unua de la Medicina Lernejo ĉeestas kvindek kvin studentoj. La sumo de 250.000 spesmiloj estas leĝdonita, por konstrui cementajn kaj ŝtalajn konstruaĵojn lerneajn, kun la plej modernaj klasĉambraj kaj laborejaj materialoj taŭgaj, por instrui plej oportune ducent studentojn.

La antaŭaj diraĵoj koncernas la sistemon de publika instruado tra la tuta Insularo, escepte la provincon Maŭran (Moro Province), kie ekzistas aparta eduka sistemo, starigita por la Maŭroj kaj sovaĝaj gentoj en tiu teritorio, sub la senpera kontrolo de la Maŭra Provinca Estraro.

La nuna politiko de l' Departemento de l' Instruado Publika, estas etendi, tiel rapide kiel eble, la faciligaĵojn por doni praktikamaniere edukadon pri la industrio, komerco, terkulturo kaj pri la hejmaj laboroj. En parolo farita antaŭ unu jaro de la aŭtoro de tiu ĉi verko, dum la ĉiujara kunveno de la lernejaj diviziaj inspektoroj, estis speciale insistate pri la fakto, ke, en la rilato de la pure akademia instruado, plej kontentigaj progresoj estis jam faritaj; sed, ke vasta kampo por la eletendiĝo de pli praktikaj rimedoj de edukado, ankoraŭ kuŝas antaŭ la Departemento.

La situacio de l' Filipina popolo, ĝiaj antaŭa instruado kaj kutimoj de pensado, la industria kaj terkultura malaltiĝo, kiu ekzistis tie ĉi dum la dek pasintaj jaroj, kaj la neceseco igi ĉiun loĝanton memsubtenanta individuo je la plej proksima dato, ĉiuj tiuj cirkonstancoj igas urĝa la kreon de l' plej vasta sistemo de industria kaj terkultura edukado, kiun la financoj de l' Estraro ebligas. Esceptaj kapableco kaj talento, por lerni artojn kaj metiojn, montritaj de la filipinaj knaboj, kaj ilia rimarkinda lerteco en la uzo de modernaj iloj kaj rimedoj, donas



ĤEMIA LABORATORIO EN LA NORMALA LERNEJO, MANILA.

la certecon al la plej fortikaj kaj praktikaj rezultatoj de tiu ĉi plano de eduka laborado.

Inter la gentoj idolanaj de la Insularo, speciala atento estas donata al la industria kaj terkultura laborado; kaj la modernaj lignoprilaboraj kaj ferprilaboraj iloj, kaj ankaŭ la terkulturaj rimedoj ŝajnas ekzerci tian strangan ensorĉon sur multaj el tiuj ĉi homoj, ke ili estas nur tro deziremaj ellerni la uzon de tiuj ĉi.

Super ĉio, la Estraro klopodas, instrui la Filipinojn, ke la lernejoj estas, same, por la riĉuloj kaj la malriĉuloj; ke ĉiuj homoj estas egalaj je la okuloj de la leĝo, kaj, ke la veraj modeloj, per kiuj ili estas juĝotaj, estas tiuj de honesteco, inteligenteco kaj fruktoportanta kapableco.

Tradukita de
Doktoro H. YEMANS,
Kuracisto en la
Usona Armeo.



LA HONORINDA W. MORGAN SHUSTER.

*Ministro de l' Publika Instruado
de la Filipina Insularo.*

Kelkaj Miroj en Nov-Jorko (1).

Kredeble ne malpli ol 500.000 veturantoj mezonombre venas en la urbon, kaj eliras el ĝi sur tiuj ĉi fervojoj ĉiutage. Kalkulante kune la veturanton komercon de la altaj kaj supraj linioj kaj fervojoj, la tuta ĉiutaga movado de veturantoj sur ĉiuj fervojoj ja estas ĉirkaŭ 2.500.000. Tiu nombro egalas ordinare du trionojn el la tuta loĝantaro de la « Pli granda Nov-Jorko ». Tiu ĉi kalkulo enhavas nek la internurban movadon per tramoj, nek per la granda ponto sur « Brooklyn ». Tiu ĉi ponto montras komercadon, kiu sola povas atingi 115.000 veturantojn ĉiujare per vagonoj, kaj 35 000 per la piedoj.

« Pli granda Nov-Jorko » estas la ĉefa disdonanta centro por la komercado en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. Tra la pordegoj de Nov-Jorko pasas ĉirkaŭ du kvinonoj el ĉiuj eksterensendoj kaj du trionoj el ĉiuj ensendoj de la lando. La tuta jara valoro de komercaĵoj, en 1898, de tiu ĉi eksterlanda komerco tra la urbo, estis 850.000.000 dolaroj. Ankaŭ dum tiu sama jaro, la urbo ricevis 3.030.000.000 buŝelojn da tritikaĵo, 6.400.000 barelojn da tritikaĵo, 29.000.000 buŝelojn da greno, 43.000.000 da ĉevaltritikaĵo, 4.400.000 buŝelojn da cekalo kaj 11.800.000 buŝelojn da hordeo. Ĝia tuta jara grena ricevado estis preskaŭ 125.000.000 buŝeloj. Se ĝi estus ŝarĝita sur ŝarĝvagonoj, tiu ĉi greno povus plenigi 1.800.000 vagonojn, t. e. senmankan vagonaron de Nov-Jorko al « Kansas urbo ». (Vidu la karton).

Alia pruvo de la grandega komercado, kiun la urbo ĝuis en 1898, troviĝas en la arego da kambioj kaj ĉekoj, kiuj trapasis tra la urbo per ĝiaj bankoj. La nombro da ĉekoj kaj kambioj ne estas konata. Sed la tuta valoro atingis proksimume, por la jaro, 29.000.000.000 dolarojn, aŭ 96.000.000 dolarojn ĉiutage, el amerika mono kompreneble.

Tio ĉi cifero estas pli granda ol la kunigitaj bankaj forsendoj de ĉiuj aliaj urboj en la Unuiĝo. 2000 dolaroj, el Ameriko mono, por ĉiu familio en la lando ne estas sufiĉaj por egaligi la komercadon de la ĉefurbo en la Nova Mondo, ĉiun jaron. Tuj pripensu tion!

Laŭ siaj fabrikadaj komercaĵoj « Pli granda Nov-Jorko » facile sin montras kiel la unua urbo en Ameriko. Tiu ĉi lasta havis en 1898, kiam ŝi kuniĝis kun multaj vilaĝoj, kaj tiam unuiĝis, 50 000 fabrikejojn postulantajn ĉirkaŭe 100.000.000 dolarojn da kapitalo. Tiuj ĉi fabrikejoj okupis 635.000 laborantojn, kaj elspezis 400.000.000 dolarojn da salajroj. La valoro de la komercaĵoj kaj produktaĵoj atingis 1.400.000 dolarojn. Nov-Jorko fabrikadis kvaronon el la tuta provizado de vestoj por viroj en la lando, kaj ankaŭ duonon el la tuta provizado de vestoj por virinoj. Tiu ĉi urbo rostigis por la Unuiĝo du kvinonojn el la provizado de kafo; kvinonon el biero, tabako, kaj cigaroj estis farata nur en Nov-Jorkaj fabrikejoj. La urbo elpresis kaj eldonis ĉirkaŭe kvinonon da paĝoj el la tuta literatura presado farata en la tutaj Unuigitaj Ŝtatoj.

En 1626, la Holandanoj aĉetis de la amerikaj sovaĝoj, la « Indians » (Indianoj) « Mahatan Insulo » nur 24 dolarojn. La ĉirkaŭaĵo de Nov-Jorko, en tiu tempo, ne estis konsiderata kiel aĉetinda. Nun la valoro de la tero kaj de ĉiuj ĝiaj konstruaĵoj kaj aldonajoj ne valoras malpli ol 4.500.000.000 dolarojn. Tio ĉi estas preciza mezonombro, nome 125.000 por unu « amerika acre », kaj unu duona (dolaro) por

unu kvadrato.

Sed, tamen, troviĝas partoj aŭ sekcioj starantaj sur malsupra « Broadway strato », la plej okupata komerca strato, kaj sur « Wall strato » la plej bank-komerca kaj obligacia strato, kiuj ne povus esti aĉetataj po milfoje tiu kosto. Tio ĉi estas vera fakto. La firmoj estas tiel kundensigitaj tie ĉi, ke oni ne povas kalkuli la valoron de la mono tie amasigita. Laboranto estus devigata elspezi la salajrojn de dudek jaroj por tie ĉi aĉeti lotaĵon de tero sufiĉe longa por provizi sin por deca enterigo. La valoro sola de la konstruaĵoj de tiu ĉi urbo estas malfacile kalkulebla. Tiu valoro ebligus aĉeti unu trionon el ĉiuj farmoj en la Unuigitaj Ŝtatoj laŭ ordinaraj kostoj.

En 1898, tiu ĉi unuigita urbo havis ŝuldon da 185.000.000 dolaroj, kio estas mezonombre 56 dolaroj da ŝarĝo por ĉiu urbano. Tio ĉi superas la elpagojn de multaj aliaj urboj. Tiuj ĉi sumoj estas tre gravaj. La urbaj elspezadoj de Nov-Jorko postulas ordinare ĉirkaŭ 10.000.000 dolarojn ĉiun jaron. Tio ĉi superas ĉiujn ŝtatajn, urbajn, urbetajn kaj vilaĝajn elspezadojn en 20 sudaj kaj okcidentaj ŝtatoj kaj teritorioj. La urbaj laborantoj povus formi armeon da 30.000 homoj, kiu estus pli granda, ol la regula armeo de la lando. El tiu ĉi, 1000 portas la bluan polician veston dum aliaj 4000, formas la blankan brigadon purigantan la stratojn.

La 1200 mejloj da pavimitaj stratoj povus etendiĝi ĝis « Minneapolis urbo », kaj la nepavimitaj stratoj povus etendiĝi antaŭen ĝis la okcidenta ŝtato nomita « Idaho ».

Nov-Jorko havis en 1898 ĉirkaŭ 1400 mejlojn da akvaj tuboj kaj 700 mejlojn da defluilegoj; ĝiaj 15 mejloj da enŝipiĝejoj kaj ŝipejoj povas etendiĝi de la « Orienta Rivero » ĝis Nov-Haveno » en la ŝtato Connecticut; ĉiuj ĝiaj riveroj povus ĉirkaŭi « Longa Insulo » n », t. e. la grandan insulon, kiu kuŝas plej proksime de Nov-Jorko.

Tiu ĉi lasta tiam ankaŭ enhavis 1000 amerikajn « acres » (14520 kvadrataj futoj) da parkoj kostantaj 150.000.000 dolarojn. Per tiu ĉi mono oni povus aĉeti kvindekakrajn farmojn por 100.000 familioj laŭ ordinaraj kostoj.

La akva provizo en Nov-Jorko estas 325.000.000 amerikaj « gallons » por ĉiu loĝanto. La akvo uzata ĉiujare povus fari kanalon largan kaj profundan, pli ol sufiĉas por naĝigi la plej grandan militŝipon. Tiu kanalo povus etendiĝi de Nov-Jorko al « San Francisco » (Fransisko) sur la « Pacifika Maro ».

Mi jam priparolis pri kelkaj miraĵoj apartenantaj nun al tiu ĉi grandega ĉefurbo. Mi montris sufiĉe ĉion, kio estas interesa en tiu ĉi potenco, plej komercada urbo. Sed, kion mi povas diri pri la estonto de la urbo? Mi ja povas diveni ion miregindan kaj strangan, sed ĉu la realeco ne superos la revon? Kio « Pli granda Nov-Jorko » estos je la fino de alia centjaro, eĉ la plej scivola kaj esperema persono ne kuraĝas profeti. Mi do ne faros tian pronon; mi rakontis pri la nuna progreso de Nov-Jorko, kaj mi kore deziras, ke post unu generacio oni povu denove verki similan priskribon.

Originale verkita de WILLIAM BAFF, USODO.

(1) *Fino. Vidu la Majan Numeron.*



ARTISTA Aŭ LITERATURA VIVADO



Ludovic Halévy kaj François Coppée.

Du veraj Parizanoj ĵus mortis, Ludovic Halévy kaj François Coppée. Ili estis preskaŭ samtempuloj, ĉar Halévy naskiĝis en 1834 kaj Coppée en 1842. Ambaŭ estis rimarkindaj speguloj de la tria franca Imperio, morala kaj literatura kompreneble. Ambaŭ, dum la imperia epoko, efektive verkis la plej originalajn verkojn kaj la plej daŭrindajn. Poste, kvankam eble pli honorataj akademiĉe, ambaŭ perdis iom da sia vera populara favoro kaj eĉ gloro. Ĉar oni povas diri, ke Halévy restos pli memorinda apud la estontuloj kiel la aŭtoro de *la Bela Heleno* (la Belle Hélène), ol kiel la akademia verkisto de pastro Constantin, (l'abbé Constantin); kaj Coppée kiel la poeto de la Intimecoj (Intimités), ol kiel la proza apostolo de la naciismo (nationalisme). Tamen tuta lia literatura vivo ĝis la fino estas malgrate ŝatinda kaj eĉ aminda de la delikatoj, kvankam lia ellaboraĵo antaŭ 1870 estas, laŭ mia opinio, historie pli preza kaj literature pli originala.

La nomo de Ludovic Halévy estas alligata al la nomoj de Meilhac kaj de Offenbach; kaj triope ili estas precipe alligitaj al la memoro de Napoleono la tria, al la ĝoja epoko, kin komenĉiĝis je la dua de Decembro, kaj finiĝis per Sedan'o. Ili havis, kiel Victor Hugo ĝin rimarkigis, la fulmontondron de la Fatalo sur la kapo, kaj la gajecon en la koro. Gajeco reale ne serioza, sed iom ŝajniga. Gajeco de entombigisto, kiuj ŝercetas sur la tombo. Kaj tio ĉi komprenigas, ke, post 1870, L. Halévy, per tre komprenebla metamorfozo, sin senigis je la ŝelo de la ŝercisto, kaj transmigradis, per iom da metempsikozo en la felon, por tiel diri, de tre morala, kvankam ankoraŭ tre sprita, moralisto kristana, kiel oni povas ĝin konstati, legante la tre moralemajn kaj eĉ predikantajn rakontojn de la lastaj horoj. La diablo fariĝis anĝelo. La ŝerca danco de *Orfeo en la Infero* fariĝis la mondana preĝo de pastro *Constantino*.

François Coppée, kiel Ludovic Halévy, naskiĝis en Parizo. Ambaŭ restis ĝis la lasta tago nur Parizanoj. Coppée est' s iom pli juna. Tamen li malvolvis sian literaturan vivon kaj agadon tra la sama, por tiel diri, morala atmosfero. Ambaŭ komenĉiĝis per la samaj sencelaj kaj nure personaj eltrovaĵoj por la intelekta amuzado; ambaŭ finiĝis per morala kaj eĉ religia, kvankam mondana, predikado. La sama ŝajna superglita vidado de la vivo en la komenco, poste la sama emo al la profundece morala.

François Coppée neniel estis scienculo. Li vere malamis la sciencan. Laŭ tiu ĉi sciencia vidpunkto li tre diferencas je sia amiko Sully-Prudhomme, Nenio filozofia en siaj verkoj, tute popularaj. Li ne havis mem la ateston pri la popola kaj sekve duagrada edukado (baccalauréat). Li pri tio gloriĝis en ia skolastika soleno, oficiala disdono de premioj en la Liceo St Louis. Tie li estis lernanto iom malŝatata de la majstroj pro lia iom malemo al la versfarado. Sed li poste havis sian ĝustatempan revengon. Li, junulo, maltrafis la skolastikan ateston. Li, ne plu junulo (1884), trafis tre bone la Akademion kaj eĉ la gloron. Tio ĉiam sen scienco kaj sen filozofio. Lia scienco estis tute kaj nure kora, lia filozofio tute kaj nure religia.

Li estis unue kaj precipe versfaradisto. Mi konscie ne diras « poeto ». Li, kiel ĉefo, partoprenis la literaturan movon, kin resumus la esprimo « Parnasanoj ». La samaĝaj tiamaĝaj parnasanoj estis Catulle Mendes kaj Leconte de Lisle. Poste Sully Prudhomme aliris la kunvenon (le Cénacle). Tiu ĉi lasta scienculo, kiel diris O. Prudent, vizitadis ĉe Leconte de Lisle, kaj li konfesis poste l'influan certan, kiun la parnasanoj havis sur lin. « Aŭdante la belajn poemojn, kiuj estis legataj en tiuj kunvenoj, li ekkomprenis, ke la beleco de la verso estas ne disigebla de ĝiaj formaj kvalitoj ». La unua kaj vera trioblo, mi ne diras triunuo, estis do kaj restos: Catulle Mendes, Leconte de Lisle, François Coppée. Eĉ oni povas diri, ke Coppée estis la plej pura manifestulo, de la parnasa movo.

Efektive kia estas esence « Parnasano »? Li estas favorulo

de la riĉa rimo, kontraŭbatalanto de la senforma verso. Ĉar, kiel li ofte diris, tro flekseblaj reguloj estas la sama afero ol nenia regulo; de la multforma verso ĝis la senforma verso la vojo estas glitiga. Sekve Coppée ĉiam observas la riĉegan rimon. Tio ĉi igas lin ofte malobservi la riĉan imagon kaj eĉ la riĉan penson. Pri tio, li sin apartigas unue de Leconte de Lisle, aliparte de Sully Prudhomme, kaj sekve, estante ne tro profundfantazia, ne tro abstrakta, li estas pli popola kaj pli populara ĉe la malgranduloj.

La malgranduloj, *la Humiloj*, estas la plej kortuŝanta temo de la poezio de Coppée. Tio ĉi estas la vere originala parto de lia ellaboraĵo. Kaj Emile Zola tion ĉi belege komprenis, kaj lumigis, kiam li varbis Coppée'on malgraŭ li mem, tio estas malgraŭ la postaj protestoj de la aŭtoro de *la Humiloj*, inter la samideanoj de la Naturalismo. Coppée efektive, la unua enkondukis en la poezian rondon la malnobelajn personojn de la malsupera militisto, de la vartistino, de la malgranda butikisto: *Et je n'ai pas trouvé cela si ridicule. C'était un tout petit épicien de Montrouge* (1). Tiuj ĉi versoj simboligas la familian kaj malfieran manieron de la verkisto, en liaj ĉarmaj popularaj rakontoj.

Tio ĉi ne malebligis Coppée'on, esti multfoje romantika kaj grandsona ĉe la teatro *La paŝanto* (le Passant) estas vere, kvankam tro malgrande tre romantika. Sed, *Centjara Batalaro* (la guerre de cent ans), *Sinjorino Maintenon* (Madame de Maintenon), *Severo Torelli*, *la Jakobitoj* (les Jacobites), *Por la Krono* (Pour la Couronne) estas vere luksaj dramoj laŭ la metodo de Victor Hugo kaj Jean Richepin.

Lia morto estis tre kristana kaj lia testamento samtempe tre simpla kaj tre nobla. Li rifuzis ĉian funebran kronon kaj paroladon; li akceptis nur la militajn honorojn pro sia amo al la armeo kaj al la nacia standardo.

PAUL BUQUET.

Malgraŭ siaj naciismaj emoj kaj sia amego al la franca lingvo, François Coppée ne pensis, ke li devas malestimigi Esperanton, ekzemplo proponinda al la homoj, kies ŝovinismo kredas necese, ĝin forigi sen ekzameno.

Mi memoros ĉiam plezure kaj danke du interparoladojn kun li, en lia gastama skriboĉambro, en kiuj mi havis la ĝojon amikiĝi al nia afero homon tiavaloran, konvinkante lin pri la taŭgeco de Esperanto por la konservado de l' naciaj lingvoj; kompreneble mi insistis precipe pri tio, kio koncernas la francan. Sian opinion li ne timis malkaŝi, permesante al mi ĝin konigi en la antaŭparolo (2) de la tiel ĉarma rakonto « Unua Kapitro de miaj memorskriboj », kiun mi tradukis kun lia kora konsento, kaj en kiu li klarigas tiel delikate la karakterizaĵojn de sia spirito. Mi devas aldoni, ke kelke da tempo poste, li havis ian konsciendubon, eksciinte, ke parolado pri Esperanto okazis en framasona loĝio, kaj timante, ke Esperanto estas subtenata de la framasonaro. Mi rimarkigis al li, ke Esperanto ne estas la propraĵo de ia ajn religio aŭ filozofio; ke la fakto, kiu lin timigas, pruvas nur, ke Esperanto estas pli kaj pli alprenata de ĉiuspecaj anaroj pro sia taŭgeco por la internaciaj rilatoj; ke, cetero, se liaj timoj havus realan fundamenton, li ne devus ĉesigi sian alemon, sed kontraŭe ĝin propagandi inter siaj sampensuloj, por kontraŭbatali sian malamikon per ĝiaj propraj armiloj. Kaj mi instigis nian kunfraton Abaton Peltier, ke li sendu al François Coppée ekzempleron de *Espero Katolika* kun tre bona propagandilo, kiun li estis ĵus eldoninta, koniganta la aprobon de lia alta Moŝto Renou, ĉefepiskopo de Tours. Iom poste, *Espero Katolika* havis la honoron publikigi tradukon de kelkaj paĝoj de *La bona Suferado*, en kiu la majstro rakontis sian konvertiĝon.

Nun li ripozas en paco; lia memoro estu daŭra en la spirito de la literaturamantoj, kiel en la koro de l' humiloj, kiujn li speciale amis. Ĝi havu ankaŭ lokon en la dankeco de la esperantistoj.

A. MONTROSIER.

(1) Kaj mi ne trovis lion ĉi tiel ridinda (parolante pri la idilio de militisto kaj de vartistino sur la benko de publika ĝardeno). — Li estis tre malgranda spicvendisto de Montrouge (parolante pri alia edza idilio ĉe la arbaretoj en la ĉirkaŭaĵo Pari'a).

(2) Vidu la paĝon 191an.

FELIETONO

La mezurado de l' metro. (1)

La mezuro senpera de linio fundamenta en Melun, per platenaj mezuriloj kvarmetraj, postulis multe da tempo kaj klopodoj. Simila laboro, kaj ne malpli peniga, okazis ĉe l' alia flanko de l' retaro triangula, (*Perpignan*). Kvankam plenumata en Francujo, ĝi ŝajnis okazi en malamika lando, tial ke tiom da malbona volo oni renkontis ĉe la urbaj estraroj.

Sendube estis skribite, ke la historio de l' Metro enhavus la plej diversajn aventurojn ne nur sur tero sed ankaŭ sur maro. Dum sia unua vojaĝo en Hispanujon, *Méchain* estis projektinta, etendi la mezuron de meridiana arko ĝis Formentera, la plej suda el Balearoj, por igi pli precizaj niajn konojn pri la supraĵo kaj la maso de la Sfero. Tiu planon la registaro de *Napoléon* aprobis; sed tuj kiam Francujo kaj Hispanujo estis interkonsentintaj, la ĵaluzo anstataŭigis *Méchain* de alia astronomiisto; tiel elokvente *Méchain* protestis, ke *Ofico de Longoj* (2) neniigis sian decidon (26 de Ap. 1803). *Méchain* do forveturas *Barcelono*'n, alvenas *Caprera*'n, malgraŭ ventego, laborinte kvazaŭ maristo, kaj retrovinte la vojon perditan de la ŝipestro. Eĉ necese estas, disdoni monon al la loĝantoj de l' insulo, tial ke ili volas malhelpi la elŝipiĝon, timante ke la ŝipo estas malpurigita de la febro flava. Ho ve! neniam el la altaĵoj de l' insulo estas sufiĉe alta, por ebligi ian celon: oni devas iri *Oropeza*'n. La scienculo riskas, esti forportata de torento; li nur malbonajn kartojn posedas; li renkontas administraciajn barojn; lin ekkaptas febro flava. Tuj resaniĝinte en gastama familio, la pasio al la astronomio lin pereigas, ĉar, ekleviĝinte por observi la astrojn, li estas ree atakata de l' epidemio, kaj mortas, jen delirante, jen dubante pri l' estonteco kaj la ĝusteco de siaj kalkuloj, malproksime de sia familio, fine elparolante tiujn kortuŝantajn vortojn: « Edzino mia, filo mia,.... triangulo!». »

Nur en 1807 la laboroj de *Méchain* estas daŭrigataj de *Biot*, kun la helpo de la juna *Francisko Arago*, kiu estis helpinta *Méchain* en Pireneoj. Tiam ankoraŭ la demando konsistis el la mezuro de triangulo, kies fundamenta linio estis 160.000 m. Pri l' ebleco de tia laboro *Méchain* mem estis iom dubinta. Kiom do bedaŭrinde estus estinte, se, post vivado ermita dum plenaj monatoj sur la supro de montoj, oni estus devigita, konfesi la senutilecon de tiom da penoj, pro la malebleco ekvidi la signalojn! Tial do ankaŭ, kiom granda estis la ĝojo de l' juna astronomiisto, kiam, plenuminte la entreprenon, kiun li juĝis ebla, *Biot* al li malkaŝis la dubojn de *Méchain*! Tiom certe estas, ke la persisteco estas virto necese al la astronomiistoj.

Tian ĝojon tamen oni devis kostege aĉeti. Revenante ja Hispanujon sur alĝera ĉebek'o (trimasta ŝipo), li estas kaptata de marrabistoj Raguzaj kaj

lin, nur kondiĉe ke li elpagos grandan sumon da oro, oni konsentas elŝipiĝi sur la bordon hispanan, kie li devas suferi la kvardektagan observadon. Poste rompiĝas la interrilitoj kun Hispanujo, kaj la ambicio de *Napoléon* preparadas teruran militon. *Biot* do rapidas forlasi landon, kie jam ne senriska estas loĝado por Francoj, ĉar timindaj estas novaj *Siciliaj Vesperoj* (3).

Sed la plej eksterordinarajn aventurojn renkontis *Arago*, al kiu *Biot*, deirante, estis ordoninta fini siajn ellaboraĵojn en Palma.

Ce l' observatorio, en kiu li estis foriĝinta, atenta nur al la ĉielajoj, li neniel priokupiĝis pri la revolucio kontraŭfranca, kiu iom post iom atingis Balearojn. La signalojn faratajn al la kontinento oni tradukis kvazaŭ tiom da avertoj donataj al Francoj, kaj la mezuradon de meridiano kvazaŭ pretekston. La alveno en *Palma*'n de oficiro de *Napoleono* (*S^{ro} Berthemie*) estis okazo al subita ribelo. Tiu oficiro estis malliberigata, kaj, ĉar oni suspektis la interrilitojn de *Arago* kun lia registaro pri la politikajoj, li baldaŭ malliberiĝas kun la oficiro. Tuj sciĝinte pri tio, hispana astronomiisto, *S^{ro} Rodriguez*, sin intermetas, kaj, lian petegon akceptante, oni permesas al ambaŭ malliberuloj kaŝe forveturi sur senmasta ŝipo, kiun oni riparos, kvazaŭ por fiŝkaptado; poste, en la havenon de Alĝero, verŝajne tiam ne malpli danĝeran ol la hispana bordo, en tiun havenon, kiun ĉiuj nacioj interkonsente timegis, ili ambaŭ ekriŝufiĝos. Ĉar la maristoj opinias, ke ili alkondukas ian riĉan hispanan nobelon, ili konspiras, por senigi lin je lia pakaĵo, sed feliĉe la martransiro ne estas sufiĉe longa, por ebligi la plenumon de tia interkonsento. Alveninte Alĝeron, la du vojaĝantoj enŝipiĝas sur « *Tri Fratoj* » n, sub alĝeria flago, al *Marseille* veturantan. Ekkaptite de hispanaj korsarajoj (marrabistoj), ili estas malliberigataj en *Rosas*; sed la Hispanoj, cedante al la minacoj de *Dej'o* (Alĝera reganto), kaj timante revenĝon kontraŭ sia konsulo, redonas la ŝipon, kiu, fine, marveturas al *Marseille*. Sed pro ventego, devigate rifuĝi en *Bougie*'on, ĝi ne povas daŭrigi la vojaĝon, ne reparite en la Alĝera pelvego (baseno).

La du Francoj do revenas Alĝer'on tere, gvidataj de *Marabut'o* (mahometa sanktulo); la leonojn de *Gurjura*, kies blekegon ili aŭdas, ŝance ili evitas; sed el la Islamaj fanatikoj ili foriras nur kondiĉe, ke ili elparolos *Fattah*'on, tio estas la kredkonfeso mahomet'a, kaj alvenas Alĝeron en la tempo de palaca revolucio. Tuj sendotaj en la punlaborejon de Alĝerio, ili estas savataj de la sveda konsulo tute sindona al sia kolego franca (pro lia boparenco *Bernadotte*), kiu postulas de la nova reganto la liberecon de niaj Francoj, ne, devige, sen mona kompenco, kiun alĝera hebreo pruntedonas. La polakro

(1) Fino. Vidu la *Majan Numeron*. — (2) Anaro da oficialaj astronomiistoj, kiuj eldonas jarlibron « la konon de l' tempoj. »

(3) *Elmortigo de Francoj en Palerme*. (1382).

alĝeria *Aziza* per multaj klopodoj evitas anglan korveton, kiu tiam estas ja tiel danĝera kiel marra-bisto Alĝera en paca tempo, sed oni devas akcepti lastan suferon, la kvardektagan observadon antaŭ Marseille, vera Itako de l' tiama Uliso. De tiu momento *Arago* estis savita, kaj kun li la paperoj de la komisiitaro de l' Metro. La peniga *Odiseo* finiĝis; de tiam nur la gloron li konis, ĉar tuj alteriĝinte al la franca bordo, li sciigis, ke lin oni proponas kiel kandidaton de Instituto, en la sekcio de Astronomio.

Tiaj estas la neverŝajnaj, sed veraj aventuroj de francaj scienculoj okaze de la mezuro de l' metro. En ia el siaj dramaj romanoj, J. Verne prezentas rusajn kaj anglajn scienculojn, en simila entrepreno, batalantaj kontraŭ simioj por repreni kajerojn de kalkuloj; sed kiom pli korpemantaj estas la realaj

aventuroj de *Delambre*, *Méchain*, *Biot* kaj *Arago*, plenumantaj malgraŭ la homvizaĝaj monstroj, kiuj baras ilian vojon, tra teraj kaj maraj danĝeroj, inter la plej teruraj politikaj konvulsioj, unu el la entreprenoj plej utilaj por la homaro! Tia historio certe estas unu el la plej mirindaj epizodoj de tiu Revolucio komencita je la nomo de la filozofio kaj humaneco, kies fruktojn ĉiu popolo estis invitota, kolekti iam kun Francujo.

Tial tiun rakonton, allogite de ĝia ĉarmo, mi tentis rezumi, por instigi ĉiujn al rajta admiro por tiuj kuraĝaj kaj obstinemaj scienculoj, kiuj honoras ne nur sian patran landon sed ankaŭ la tutan homaron.

ERNEST BACQUET.



FINIĜO DE KURSARO.

Ĉar en multaj urboj finiĝas la kursoj pri Esperanto, ni opinias, ke la jena rakonteto verkita de nia juna samideano Josefo Pion interesos niajn gelegantojn.

En la ĉiam verda urbo Amujo, unu el la ĉefaj urboj de Esperantujo okazis dum la vintro (mi parolas pri la vintro tera, sed ne pri Esperantujo, ĉar en ĝi nur unu sezono estas: printempo) kursoj pri Esperanto. La tiea grupo sukcese organizis ĝis 14 kursoj, ĉu en la grupĉambro, ĉu en la lernejoj de la urbo. (Mi parolos nur pri tiuj en la grupĉejo).

Kvankam, inter la kursoj organizitaj ĉe la grupĉejo, estis unu speciale farata por la fraŭlinoj, fraŭlinoj ankaŭ partoprenis la aliajn kursojn, kaj ili ne estis la malpli belaj ornamoj kaj la malpli laboremaj lernantinoj: kontraŭe ĉiuj fraŭlinoj alvenis la unuaj, atente aŭskultis, zorge faris la ekzercojn kaj mirege... elparolis, ne forgesante la tonan akcenton nek la akuzativon.


Junulo tre ordinara, sed iom severa, faris unu el la kursoj: eble pro tiu severeco li ne havis multajn lernantojn; sed fraŭlinoj, komence unu aŭ du, pli malfrue ĝis ses, ĉeestis tiujn kursojn. Ĉiuj, lernantoj kaj lernantinoj interesiĝis pri la internacia lingvo, sed fraŭlinoj (ĉiam fraŭlinoj!) pli multe ol viroj aŭ junuloj. Kial do ili ŝatis tiel la lingvon « Zamenhofan »? Ĉu ĝin ili trovis facila? Jes sendube; sed mi kredas, ke alie oni devas serĉi la veran kaŭzon de tiu emo de fraŭlinoj por lernado de Esperanto. Kie do estas tiu kaŭzo? En la kialo mem de la lingvo? Kial Zamenhof kreis Esperanto'n? Por la paco inter diversnaciaĵoj, por la amo inter ĉiuj homoj. Jen mi kredas la vera kaŭzo de lernemo de fraŭlinoj: jes amo, amo al ĉiuj homoj, amo al esperantistoj, amo al samurbanoj, amo al samklubanoj, amo... sed mi tro rapidas, kaj la legantoj de « Tra la Mondo » riproĉus min pri tio.

Ĉiuj fraŭlinoj do atente studis; sed inter ili estis unu ĉarma, bela fraŭlino, (cetere ĉiuj fraŭlinoj estis belaj, sed tiu ĉi estis pli bela ol ĉiuj aliaj), kun okuloj, kiuj diris multe pli bone ol longaj paroladoj la amon, kiu en ŝi estis. Kelkafoje okazis, ke tiu fraŭlino rigardis tra la ĉambro reveme, forgesante, ke ŝi devas aŭskulti la profesoron. Tiam ĉi tiu iom severe ŝin rememorigis pri ŝia devo, kaj ŝi lernis atente. Aliafoje, ŝi rigardis sed iom timeme rekte al la profesoro, kaj tuj klinis la palpebron, kiam li ŝin rigardis. Iam ŝi sidiĝas apud la profesoro, kaj tiu ĉi, post klarigo per la nigra tabelo, residiĝas, sed ho! li marŝas sur la piedon de l' fraŭlino, tuj li senkulpigas sin, petante pardonon; « la glacio estas rompita, » kaj antaŭ la fino de l' sama kurso, la profesoro kaj la lernantino havis sekretan inklinton unu por la alia.

De tiu tago la piedpremita fraŭlino studis malbone Esperanton, kaj la profesoro devis peti klarigojn al ŝi. Ŝi respondis: « Mi ne scias, kial sed de la tago, kiam vi marŝis sur mian maldekstran piedon, mi malbone komprenas. » — « Sendube vi volas moketi min, fraŭlino » — « Ne sinjoro, kaj bonvolu do, veni morgaŭ vespere hejmen, por fari kurson al mi antaŭ miaj gepatroj. » — La profesoro plezure akceptis tiun okazon, konatigi de la gepatroj de tiu ĉarmoplena fraŭlino, kaj respondis post la necesa ŝanceliĝo. « Jes, mi iros morgaŭ vespere ».

Kiel li diris, la junulo iris la morgaŭan tagon al la ĉarma fraŭlino, kiu lin malpacience atendis. Ŝi lin prezentas al siaj gepatroj, kaj la kurson komenciĝas. La patro iras al sia skriboĉambro, kaj la patrino puntfaras apud la gejunuloj. Sed momente ŝi eliras, la kurso haltas, ili silentas, nek li nek ŝi kuraĝas paroli, ambaŭ samtempe premas la manojn de l' alia, kaj kareseme la fingretojn ŝiajn li kisas; fine post tia restado, li diras:

PROFESORO CORNIL.



Granda perdo por la scienco estas la morto de Profesoro Cornil, eksprofesoro ĉe la Pariza medicina fakultato, ano de la medicina akademio. Li dediĉis sin precipe al la patologia anatomio; unua en Francujo, li elmontris la utilecon de l' mikroskopuzaj serĉadoj aplikitaj al la patologia anatomio. Ankaŭ unu el la unuaj li komprenis la gravecon de l' eltrovoj Pasteur'aj, kaj organizis la unuan instruadon de la bakteriologio en la fakultato, kun sia lerninto Chantemesse.

Homo tre afabla, P^{ro} Cornil navis ankaŭ belan politikan vivadon. Li estis bopatro de S^{ro} Messimy, la konata deputito de l' departamento Seine.

« Fraŭlino, vin mi amas, ĉu vi permesas al mi, peti vian manon al viaj gepatroj? » — « De la tago kiam vi marŝis sur mian maldekstran — korflankan — piedon, mi vin amas; kaj jen la kaŭzo de mia mallaboremeco. Jes, petu mian manon; geedziĝu ni rapide, kaj kiel geedzvojaĝo ni iros al Weisser Hirsch, kaj ĉeestos la kvaran; ne nur por nin ami reciproke; sed por ami ĉiujn kunvenintojn. »
JOSEFO PION.

Noto 2^a de la artikolo pri François Coppée.

(2) « Lingvo plena, posedanta nekompareblajn riĉecon kaj flekseblecon, kapabla ĉion esprimi, tiel same per la parolo, kiel per la plumo. Esperanto disvastiĝante — kaj min plezurigas tiu ĉi via propra komprenebla — antaŭŝirmos la naciajn lingvojn kontraŭ la reciproka miksiĝo, kiu ĉiutage plimulte ilin elnaturigas, pro la pli kaj pli intima kontakto de la diversaj popoloj..... ».

El « Unua Ĉapitro de miaj Memorskriboj ».

Miksajoj

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzajoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksajoj ». La personoj, kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^e Krom esceptoj speciale direktaj la solvoj devas esti senditaj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaj konkursoj aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al S^{ro} Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

Problemoj solvotaj (4^a kvaronjaro).

PROBLEMO 24^a (de Bacquet).

Laŭ la — de la modo, elegantema — postulas pli ol unu — da —.

Anstataŭ la strekelojn per taŭgaj vortoj, riĉe kunrimantaj.

PROBLEMO 25^a (de Bacquet).

Kia estas la plej danĝera kuracilo pri moroj?

PROBLEMO 26^a (de l' sama).

Kia meblo estas prezentita preskaŭ milfoje en tiu ĉi gazeto?

PROBLEMO 27^a (de Quertant).

Mi eksplodas; ŝanĝu unu el miaj literoj, kaj serĉos min la kuracisto; ŝanĝu ree unu el miaj literoj, kaj mi fariĝos homa korpa parto.

PROBLEMO 28^a (de l' sama).

Mi doloras la homojn kun L; mi kun F ilin ĝojigas, kiam ili min trinkas; kun P, parto homokorpa.

PROBLEMO 29^a (de Ch. Brunet).

Mi havas du aŭ kvar piedojn sed iafoje tri piedojn; kiu mi estas?

PROBLEMO 30^a (de l' sama).

Kiamaniere prenante ovon kaj literon oni povas fari ujon paperan?

RIMARKO: La solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la 1^a de Aŭgusto 1908 ĉe:

Ch. Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux (France).



A. « Oni diras ke orajisto X^x nenion forgesas!

B. « Tion mi povas bone kredi, ĉar li ja, tiom multe memoras (mem oras).

— Kia horo estas la plej konvena por manĝi?

— Por riĉulo, kiam li volas; por malriĉulo kiam li povas Esp. 10072.

PROBLEMO EKSTER SERIO (de Nazumulo).

GAN	LE	PRI	KO	PRO	Ox
DE	SED	PA	NI	LA	RAN
GAS	DO	NON	AL	ZO.	DE
PLA	DRES	VI	TOJ	BON	KVA
DE	SUR	« VE	NON ».	LO	KAR
NU	SIM	GA	LA	RA:	VE

REABONO

Denove ni petas, ke oni bonvolu **TUJ RENOVIGI** la abonojn, kiuj finiĝas kun tiu numero.

La personoj, kiuj reabonos antaŭ la 15^a de Julio, povos ricevi « Unna Ĉapitro de miaj memorskriboj » aldonante nur 50 c. (20 sd.).

Inter la geŭvenintoj de tiu problemoj oni lotmontras unun, kiu ricevos 20 poŝtkartojn propagandajn (luksa eldono).
La solvo estos akceptata ĝis la 1^a de Septembro 1908.



Ĝentila vorto, ferajn pordojn malfermas.

Kie ne estas timo, tie ne estas honto.

Korvo de korvo l' okulon ne maŭgas.

Malbono estas pli maljuna ol la mondo.

Bezono leĝon malrespektas.

Ĉiu vilaĝo leĝon havas.

Dio prokrastas sed ne forgesas.

Unu kukolo printempon ne faras.

Satulo, satulon ne kredas.

Sana homo ĉion povas.

Esperantigis el la lingvo Bulgara: Konstantino Burev.

Vortludoj Esperantaj.

Esperantisto, ĵurnalon leganta: « Mi trovas la paperon de tiu ĉi gazeto iom maldika, eĉ preskaŭ travidebla ».

Samideano: — « Ne miru! Pro tio mem, ĝin oni nomas: « gazeton » (gaz-et-on) ».

J. W. EGGLETON.

« Kial vi difinas tiun sinjoron kiel diamanton? ĉu li estas tre riĉa? ĉu li multe taŭgas, multe valoras? »

Ne; mi volis nur diri ke li estas tre pia (di-amanto) ».

Kiel vi volas, ke mi razu vin? — « Silente ».

CH. BRUNET,

59, Cours Victor Hugo, Bordeaux-France.

Al la amerikaj grupoj esperantistaj!

La 25^a de decembro 1908 kunvenos en Santiago-de-Ĉilando la 1^a Tutamerika Scienca Kongreso.

Ni ne bezonas insisti, por ke vi komprenu la gravecon de tiu okazo por nia afero.

Jam la nomoj de la oficialaj delegitoj estas publikigitaj en la gazetaro.

Kelkaj el ili estas konataj esperantistoj kaj amikoj de nia lingvo. Ni citos nur Sinjorojn *Frederiko Villareal*, el Perulando *Medeiros e Albuquerque*, el Brazillando kaj *Gregorio Mendizábal*, el Meksiklando.

Sed ni ne devas resti senagaj dum tiu tempo. La devo de amerikaj esperantistoj estas klopodi apud la delegitoj de sia lando, por ke ili konu nian aferon, kaj estu favoraj al la proponoj.

Al la laboro!

El alvoko de

La Brazila Ligo Esperantista.

1/1/08.

Tiu agado estas tute konforma al tiu, kiun la Alĝera grupo konsilis, kiam mi havis la honoron ĝin prezidi. Mi do energie insistas pri la graveco de tia alvoko, farinda en ĉiuj similaj okazoj.

A. M.

Portretoj grafologiaj.

Por koni sian karakteron, oni sendu ĉe nian administron 10 liniojn el sia skribado kaj duonspesmilon (1 f. 25).

S^{ro} V. H., en A. — Jen estas voluptamanto kaj karaktero verdirema kaj nekaŝema — Ŝatas la estetikon, sendube artisto — Pasia amemo. — Dolĉeco — Afabla sed obstinema. Ŝatas la komforton, kaj havas instinktojn por malŝpari — Dedukema spirito — Honesta kaj kuraĝa — Spirito laborema kaj agema — Varma gajeco — Ordema — Karaktero scianta esti decida — Multe da imago — Tre deziras akiri.

Fino C. I., en P. — Granda inteligenteco. — Spirito bone ekvilibrata, laborema kaj viva. Karaktero dolĉa, sed scianta ordoni — Amemo — Sentema koro, kiun tamen oni ne povas potenci — Bonfarema, servema — Iom malhumila komparante sin kun aliaj — Bona juĝo — Ĝustaj ideoj — Verdirema kaj diskreta — Rapida komprenemeco — Volo forta kaj decida — Ŝparemeco kaj egoismo — Pesimismo intelekta — Energio — Temperamento sangriĉa — Agemeco korpa.

H. LAISNEY.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis. tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



FLOR ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas de la konfido kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



MARKO LIVERITA

CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparajoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed-tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista
Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. —
11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj
impostoj.

ALILANDE. — 4f ĉiu botelo
prenita en S^t Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por
Francujo kaj Fremduloj:

J. B. Brunon-Chauvet
S^t Etienne (France).

Legu DUONSURDA kaj
UNUA ĈAPITRO.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,
Genevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjøbenhavn (Danujo).



LASTAJ SCIIGOJ.

Dum la korektoj de la presprovaĵoj ni ricevis ankoraŭ novan ĵurnaletan « *The Australian Esperantist* », per kiu niaj aŭstraliaj amikoj intencas kurage antaŭenpuŝi nian aferon. Do ĉie estas nobla konkurenco por Esperanto. Jam preskaŭ forgesiĝas la krizeto travivita. La « malvarmetuloj » forgesu siajn nepravigitajn timojn kaj iru kurage antaŭen. (1 numero, 12 sd. ĉe the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria, Aŭstralio).

Ankoraŭ Chilaj esperantistoj donas okazon paroli pri ilia agado. Tre bela kaj interesa ilustrata semajna revuo: *Zig-Zag*, enhavas dupagan artikolon kun bildoj, tute favoran por Esperanto.

En ĝi, kiel aldono, kuŝas granda plano de « domaro Biaux » kun esperantistejo kaj granda vojo Esperanto. S^{ro} Biaux, tre fervora, estas konsulo esperantista en Santiago de Chile.

Katolika Komitato dum la Kvara.

Prez.: Kanoniko Pichot, prez. de la « Institut de la Paix » en Princlando Monako. — Sek.: Abato Austin Richardson (Bruselo.) — Direktoro por la Diservoĵo dum la kongreso: Pastro Frohns, paroĥestro de Warstade (Hanovro-Germanujo). — Sek. de S. K. I.:

Abato Derroite, Parizo. — Sek. de P. E. F.: Abato Richardson.

Religia diservo, meto kun prediko en Esperanto de Abato Pichot okazas la 16an, tre volonte permesita de la Dresdena episkopo

S^{ro} Hedstrom-Svedujo. Via artikolo aperos. Pacienĝu.

PRESISTOJ !! Fotografadisto volas vendi serion da memfaritaj poŝtkartoj ilustritaj kun bildoj el Holanda Indio, taŭgaj por reprodukto. Adresu proponojn al J. Olivier, Meester Cornelis, Indes Néerlandaises.

POŝHORLOĜO

“L'ESPERO”

FAVORAJ PREZOJ POR NIAJ
ABONANTOJ.

Por Sinjoroj: 30 fr. (12 sm.).

Por Sinjorinoj: arĝenta, 45 fr. (18 sm.);
ora 90 fr. (36 sm.). Oni aldonu al la mendo
la abonon banderolon.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita 0f. 50; Francuje, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al Sro Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Printraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Sciencia kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe Sro Marich Agoston, Budapest IX, Ŭilői-ut 59. IV, 8.

Voĉo de kuracistoj. — Monata organo por internacia korespondado de kuracistoj en aferoj profesiaj, etikaj kaj social-medicinaj. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.) ĉe D^{ro} Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL.

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo, nun reformema: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco. Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe British Esperanto Asocio, Museum Buildings, High Holborn, W.C. London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3k. por Aŭstrio Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la SfpE: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Filipina Esperantisto. — Organo de Filipina Esperanto Asocio. Jare 5 fr. (2 Sm.) P. O. Box 326, Manila.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — No 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, no 2299 V. Tirnovo, Bulgario.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.) Warszawa, Hoza, No 40, m. 8.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Esper. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.) 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l'reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila No. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja Noj. 2,40 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de
FRANÇOIS COPPÉE,

Ano de la Franca Akademio,

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.

75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.
Bona familia kuirajo je moderaj
RESTORACIO prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton
ANONCAGENTO. C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

—> Sro Ch. Schefy (?) bonvolu sciigi kial, antaŭ 2 monatoj, li sendis al ni 37 frankojn sen ia ajn sciigo.

Fraŭ'o-junulo deziras korespondadi per leteroj-fotografajoj kun Italaj, Konstantinopolaj kaj Afrikaj geesperantistoj. Adreso: Rusujo. Permskaja gub; zavod Lisva, psal. Evgeniu Bogolubovu.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LI ERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Presa Esperantista Societo,

33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevbla

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevbla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitteroj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj **ESPERANTO**. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por **ESPERANTO**.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.